

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
tipografia edizioni **SAVIOLO** s.n.c. - Vercelli

Anno 92 - n. 6
NOVEMBRE-DICEMBRE 2013

KRISTNASKO 2013

È Natale ogni volta
che sorridi a un fratello
e gli tendi la mano.

È Natale ogni volta
che rimani in silenzio
per ascoltare l'altro.

È Natale ogni volta
che non accetti quei principi
che relegano gli oppressi
ai margini della società.

È Natale ogni volta
che spera con quelli che disperano
nella povertà fisica e spirituale.

È Natale ogni volta
che riconosci con umiltà
i tuoi limiti e la tua debolezza.

È Natale ogni volta
che permetti al Signore di rinascere
per donarlo agli altri.

Estas Kristnasko ĉiufoje
kiam vi ridetas al frato
kaj etendas al li la manon.

Estas Kristnasko ĉiufoje
kiam vi restas silente
por aŭskulti la alian.

Estas Kristnasko ĉiufoje
kiam vi ne akceptas tiujn principojn
kiuj formetas la subprematojn
al la margenoj de la societo.

Estas Kristnasko ĉiufoje
kiam vi esperas kun la malesperantoj
en fizika kaj spirita malriĉeco.

Estas Kristnasko ĉiufoje
kiam vi rekonas humile
viajn limojn kaj vian malfortecon.


Estas Kristnasko ĉiufoje
kiam vi permesas al la Sinjoro renaskiĝi
por Lin redoni al la aliaj.

Madre Teresa di Calutta Patrino Tereza el Kalkato

LA REDAZIONE DI KATOLIKA SENTO AUGURA A TUTTI BUON NATALE
LA REDAKCIO DE K.S. BONDEZIRAS AL ĈIUJ BONAN KRISTNASKON

Testimonianze dalla Chiesa che soffre

L'arcivescovo di Karachi (Pakistan) a Milano l'8 ottobre



mons. Joseph Coutts

Nel contesto delle manifestazioni per il centenario dell'Editto di Milano, si è svolto, presso l'Università degli Studi di Milano, un convegno dal titolo: "**Libertà religiosa, testimonianza diretta della chiesa che soffre**". L'iniziativa è stata promossa dal Servizio di Coordinamento dei Centri Culturali Cattolici della Diocesi il cui responsabile è il nostro assistente ecclesiastico mons. Giovanni Balconi. Al convegno ha partecipato un gruppo del *Katolika Esperanto-Centro* di Milano.

I relatori sono stati: mons. Balconi, che ha introdotto il tema, il dr. Massimo Ilardo, che ha parlato dell'opera di "Aiuto alla Chiesa che Soffre", il prof. Luigi Amicone, direttore di "Tempi", che ha parlato della libertà di coscienza, il prof. Giulio Giorrello dell'Università degli Studi di Milano, che ha parlato del pluralismo religioso, e infine mons. Joseph Coutts, arcivescovo di Karachi che ha tenuto una *Lectio Magistralis*: "Testimonianza della Chiesa che soffre in Pakistan" di cui diamo una sintesi in italiano e alcuni stralci nella traduzione in Esperanto.

Mons. Coutts ci ricorda che il padre fondatore del Pakistan moderno, Ali Jinnah, era un Musulmano moderato, che voleva uno stato democratico con libertà di culto per ogni religione ed essa infatti è riconosciuta dalla costituzione.

Quando nel 1977 salì al potere il generale Zia-ul-Haq, questi introdusse alcune leggi islamiche tra cui la *legge sulla blasfemia* che condanna a morte chiunque offenda il profeta Maometto e all'ergastolo chi profana il Corano. Essa è divenuta fonte di continue violenze contro cristiani e fedeli di altre religioni. Secondo dati che risalgono al 2010, dei 38 giustiziati per blasfemia, 14 erano cristiani (che sono meno dell'1% della popolazione).

Ma non è solo la *legge sulla blasfemia* causa di sofferenze per noi. C'è anche la discriminazione. Nella mente di ogni Musulmano c'è l'idea di *dhimmi* (così viene chiamato il non musulmano). Questi viene discriminato sul lavoro, deve pagare una tassa speciale e viene particolarmente controllato dallo stato.

La guerra in Afghanistan ha contribuito a fomentare l'intolleranza. Per combattere contro il Comunismo dopo l'invasione sovietica del 1979, giovani musulmani furono addestrati per combattere una *Jihad* (Guerra Santa) contro gli infedeli con il sostegno finanziario dagli Stati Uniti e dall'Arabia Saudita. Dopo la sconfitta dell'esercito sovietico, i combat-

tenti si rivolsero contro le forze NATO, percepite come forze cristiane che attaccano un paese Musulmano.

La situazione si esasperò nel 2001 dopo la distruzione delle Torri Gemelle. I bombardamenti americani sull'Afghanistan furono percepiti come una crociata dei Cristiani contro il mondo islamico.

Mons. Coutts conclude con parole di speranza riprese dalla 1.a lettera di Pietro ("*E se anche doveste soffrire per la giustizia, beati voi! ...*"), dalla 2.a lettera ai Corinzi ("*Siamo infatti tribolati in ogni maniera, ma non schiacciati; ...*") e da Papa Francesco ("*Possiamo imparare di nuovo a camminare e percorrere le vie della pace...*").

El la atesto de mons. Joseph Coutts Ĉefepiskopo de Karachi (Pakistano)

La fondinto de Pakistano, Muhammad Ali Jinnah, estis modera kaj iluminita, kiu volis, ke la nova ŝtato, Pakistano, lando de la muzulmanoj, fariĝu moderna kaj demokrata ŝtato. Li ne volis ŝtaton pure islaman aŭ teokratian. Jam en 1948, Jinnah diris en unu el siaj paroladoj ĉi tiun frazon: “Vi estas liberaj iri al Moskeo, iri al templo aŭ al iu ajn preĝejo. Tio en kio vi kredas neniel koncernas la ŝtaton. Vi nun estas civitanoj egalrajtaj en libera lando. Ni de nun devas lerni esti Pakistanoj. [...]”.

Tamen, jaron post jaro, islamaj grupoj ekfortiĝis kaj faris premon sur ĉiun registaron por enŝovi islamajn leĝojn kaj transformi Pakistanon en Islaman Landon. Granda impulso al tio okazis, kiam la armea diktatoro, generalo Zia-ul-Haq, akiris la regadon en 1977. [...] Generalo Zia enŝovis kelkajn islamajn leĝojn, sed la leĝo, kiu donas al ni la plejmulton da problemoj, estas la tiel nomata Leĝo pri la Blasfemado, enigita en 1978. Laŭ ĉi tiu leĝo, kiu ajn parolas kontraŭ la profeto Mahometo, aŭ makulas lian nomon skribe aŭ alimaniere, devus esti mortkondamnita. Ĉi tiu leĝo diras ankaŭ, ke tiu, kiu profanas la Koranon, devus esti kondamnita al dumviva karcero.

Vi ĉiuj konas la kazon de Asia Bibi, malriĉa kristana vi-

rino mortkondamnita. En tiu periodo la guberniestro de Punjab, la plej potenca provinco de Pakistano, vizitis Asian Bibi en karcero kaj konsilis ŝin skribi al la pakistana Prezidanto por peti indulgon de li. Post nemulte la guberniestro estis murdita en la ĉefurbo Islamabad. Tio okazis, ĉar la fanatikuloj, kiuj organizis lian murdigon, akuzis lin esti malbona muzulmano, ĉar neniuj povas pardoni insulton al Profeto, eĉ ne la Prezidanto de Pakistano. [...] Laŭ la datenoj reirantaj al jaro 2010, el la 38 personoj mortigitaj pro blasfemado, 14 estis kristanaj. [...]”.

Sed ne nur la Leĝo pri la Blasfemado estas kaŭzo de suferoj al ni. Ĉiam estas diskriminacio kontraŭ la ne-muzulmanoj. La ne-muzulmanoj ne estas konsiderataj civitanoj same kiel la aliaj, kaj ili devas elteni diskriminaciojn diversmaniere, precipe kiam oni serĉas laboron aŭ por akiri promociojn. [...]”.

Alia grava faktoro, kiu kontribuis al la estigo de societo ĉiam pli netolerema kaj malfidema estas la milito en Afganistano.

Por batali kontraŭ komunismo, post la eniro en Afganistanon de la Soveta Armeo en 1979, multaj muzulmanaj junuloj estis trejnitaj al la *Jihad*, aŭ Sankta Milito, kontraŭ *kefir*, aŭ malfideluloj, kiuj okupis



ilian landon. Junaj viroj devenintaj el Pakistano kaj el aliaj islamaj landoj estis senditaj en Pakistanon por trejniĝi, por poste batali en Afganistano. Ĉi tiu politiko estis subtenata kaj financita de Usono kaj de ĝia aliancano Saudi-Arabio. Kiam la soveta armeo estis finvenkita kaj elpelita, la memaj batalantoj por la libero turniĝis kontraŭ la armitaj trupoj de NATO, rigardataj ankaŭ ili kiel malfidelaj. Tial ke la NATO-trupoj elvenas precipe el la Okcidento, ili estis perceptitaj kiel kristanoj, kiuj atakas muzulmanan landon (Afganistanon), tiel kiel oni faris en alia muzulmana lando, Irako. [...]”.

Post la detruo de la Ĝemelaj Turoj en Novjorko la 11-an de Septembro 2011, la usonanoj komencis bombadi Afganistanon, landon najbara al ni, kaj poste alvenis la NATO-trupoj. [...]”.

Oni perceptis la ĉeeston de la NATO-trupoj en Afganistano kiel kristanan atakon al muzulmana lando. Kelkaj imamoj

komencis disvastigi la ideon, ke la kristanoj (t.e. la Okcidento) ekstarigis krucmiliton por domini kaj humiligi la muzulmanoj de la mondo. Pro tio la kristanoj en Pakistano estis konsiderataj kiel agentoj de la kristana Okcidento, kaj pro tio, malamiko de Islamo. [...].

Dank' al niaj multenombraj edukaj institucioj, al la hospitaloj kaj al soci-karitataj iniciatoj, ni laboras kune kaj favore de personoj de ĉiuj fidoj. Ĉi tiuj institucioj kaj iniciatoj estas videbla atesto de amo kaj de servemo de la kristanoj al nia lando. Ni estas malgranda minoritato, sed agema, kiu kontribuas al la evoluigo de Pakistano. Ni estas ankaŭ en kontakto kun multaj aliaj muzulmanaj ne-registaraj organizoj por la plibonigo de la societo kaj la pliigo de la socia harmonio.

Ni akiras forton el la vortoj de Sankta Petro Apostolo: "Se vi eĉ suferus pro justeco, feliĉegaj vi! Ne ektimu, nek maltrankviliĝu pro timo antaŭ ili, sed adoru la Sinjoron, Kriston, en viaj koroj, ĉiam pretaj doni defendan respondon al ĉiu, kiu vin demandas pri la motivo de la espero, kiu estas en vi". Ankaŭ la vortoj de Sankta Paŭlo estas antaŭ ni: "Fakte ni estas premegataj ĉiamaniere, sed ne neniigitaj, embarasataj, sed neniam malesperantaj, persekutataj, sed ne forlasataj, falingataj, sed ne mortigitaj, ĉiam kaj ĉie portante en la korpo la mortigon de Jesuo, por ke ankaŭ la vivo de Jesuo elmontriĝu en nia korpo".

Fine Papo Francisko, dum la tago de preĝo kaj fasto por la paco en Sirio, diris "Ĉu ni povas denove lerni paŝi kaj laŭiri la vojojn de la paco? Al-

vokante la helpon de Dio, mi volas respondi: Jes, tio eblas, por ĉiuj! Ĉi vespere, mi volus, ke de ĉiu loko de la tero ni krii: Jes, tio eblas por ĉiuj! Eĉ mi volus, ke ĉiu el ni, de la plej malgranda al la plej granda, ĝis tiuj, kiuj estas alvokataj al regado de la nacioj, respondu: Jes, ni tion volas!". [...].

Ni devas lerni vivi kaj agi kune en ĉi tiu moderna mondo kun homoj de malsamaj religioj, kaj kun homoj kiuj estas liberaj ne kredi. Mi kredas, ke ĉia formo de ekstremismo, ĉu religia, ĉu ideologia, montras enfermiĝon de la menso kaj de la koro fronte al la realo, kiu nin ĉirkaŭas.

Ni preĝu, por ke ĉiuj kristanoj povu agi por esti atestantoj de espero, atestantoj de amo, atestantoj de paco kaj atestantoj de repacigo en mondo ĉiam pli maltolerema kaj perforta.

(la tuta teksto estas legebla en la itala ĉe:

http://www.chiesadimilano.it/polopoly_fs/1.82182.1382517109!/menu/standard/file/08-OTTOBRE-2013.pdf)



LA VOJO DE LA PREĜO

***Mi lante promenas piedire
laŭlonge de vojo kampara
plenanta je foraj memoroj;
kaj for de l' popola amaso
mi diras mallaŭte la preĝon.***

***Nun flanke, la eta hundino
korkantas al vivo laŭ propra
natura, naiva lingvaĵo.***

***Kaj ĉiu nun faras la preĝon
en propra de si rozario.***

Carlo Odisio



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

TUA È LA GLORIA

Chi di noi non è attento ai segni di gloria presenti sulla nostra strada? In ogni ambiente di vita e di lavoro sentiamo spesso espressioni autoreferenziali del tipo: «*Siamo stati bravi!*», «*È stato quasi un trionfo!*», «*Quanta gente è intervenuta!*», dettate dal continuo bisogno di valorizzare le nostre iniziative e le nostre attività. Molti si immedesimano con attori e personaggi vari, affascinati dall'alone di gloria aleggiante attorno a loro.

Il poeta Alessandro Manzoni, impressionato dalla figura del grande Napoleone Bonaparte, uscì con questa domanda: «*Fu vera gloria?*», trattenendosi dal dare una sua risposta. Questa è stata lasciata "ai posteri", in quanto sarà il tempo a ridimensionare energicamente il fulgore impressionante del grande condottiero. Infatti la gloria passeggera si confonde facilmente con la vera gloria, quella che tutti noi cerchiamo: la gloria che resiste al tempo e che risplende in ogni situazione.

Noi siamo sempre molto rattristati dalle miserie della nostra vita, dalla fragilità dei nostri sentimenti, dalla vulnerabilità dei nostri desideri. Questo spiega il perché siamo molto attenti a tutte le offerte di gloria presenti sul mercato: il benessere, la salute, la bellezza del corpo, la disponibilità di mezzi e denaro, la visibilità sulla piazza, sul giornale, alla televisione. Perfino un papa, che viene «*quasi dalla fine del mondo*» e che parla di cose sante, è guardato con ammirazione e fascino: ognuno di noi

VIA ESTAS LA GLORO

Kiu el ni ne atentas la signojn de gloro ĉeestantajn sur nia vojo? En ĉiu medio de vivo kaj de laboro ni ofte aŭdas mem-referantajn esprimojn kiel: «*Ni estis lertaj!*», «*Ĝi estis preskaŭ triumfo!*», «*Kiom da homoj partoprenis!*», sugestitajn de la daŭra bezono valorigi niajn iniciatojn kaj aktivecojn. Multaj homoj enmemiĝas en roloj de aktoroj kaj de diversaj gravuloj, ravataj de glor-haloo ŝvebanta ĉirkaŭ ili.

La poeto Aleksandro Manzoni, impresita de la figuro de la granda Napoleono Bonaparte, starigis ĉi tiun demandon: «*Ĉu ĝi estis vera gloro?*», sin detenante doni respondon. Ĝi estis lasata "al la posteuloj", ĉar estos la tempo, kiu energie reĝustigos la impresan brilegon de la granda kondotiero. Fakte la efemera gloro facile konfuziĝas kun la vera gloro, tiu, kiun ni ĉiuj celas: la gloro rezista al la tempo kaj brilanta en ĉiu situacio.

Ni estas ĉiam multe ĉagrenitaj de la mizeroj de nia vivo, de la fragileco de niaj sentoj, de la vundebleco de niaj deziroj. Tio klarigas, kial ni multe atentas ĉiujn ofertojn de gloro surmerkategitajn: la bonstaton, la bonfarton, la korpan belecon, la disponon pri rimedoj kaj monsumoj, la videblecon sur placo, sur ĵurnalo, ĉe televido. Eĉ Papo, kiu venas «*preskaŭ el la fino de la mondo*» kaj parolas pri sanktaj aferoj, estas admire kaj ĉarme

desidera stare lì dove guarda tutto il mondo, lì dove la miseria della vita umana è circonfusa in un alone di gloria.

Dal momento che l'uomo non può trovare in sé la pienezza della vita, la deve cercare guardando fuori di sé. Esposto alle prove e ai rischi della vita, l'uomo non si sente mai al sicuro, mai nella pace. Egli sa che solo Dio è eterno, ha la pienezza della vita e vive nella gloria. Infatti, quando pensiamo a qualcosa di grande, subito diciamo che è divino. Di solito Dio è pensato come un estraneo, in quanto tutto differente da noi, come uno che vive lontano su nel cielo, attorniato da angeli e santi, come uno che fa quello che vuole: egli non soffre, non s'ammala, non muore. In breve la gloria di Dio è tutto quello che manca all'uomo quaggiù. Ma è tutto invidia.

Ireneo di Lione, invece, scrive che *«la gloria di Dio è l'uomo vivente»*. In altre parole si può dire che Dio si gloria quando riesce a tener in vita l'uomo, pur nella fragilità e miseria. Simone Weil infatti, riflettendo sulla realtà dell'uomo, arriva a dire che *«è stato un amore inconcepibile a spingere Dio a creare degli esseri come noi così lontani da lui quanto lo può essere una creatura ragionevole»*. E più sotto: *«Più io sono mediocre, più è evidente l'immensità dell'amore che mi mantiene nell'esistenza»* (S. Weil, L'amore di Dio).

È doveroso allora ripetere spesso: *«Tua è la gloria nei secoli»*, dal momento che Dio mai si glorifica come facciamo noi. Se poi è vero che la nostra vita bene vissuta rende gloria a Dio, allora proibiamoci di gloriarci inutilmente tra di noi e diamo gloria a Dio oggi e nell'eternità.

rigardata: ĉiu el ni deziras esti tie, kien rigardas la tuta mondo, tie, kie la mizero de la homa vivo estas aŭreolita per gloro.

Tial ke la homo ne povas trovi en si mem la plenecon de la vivo, li devas ĝin serĉadi rigardante ekster sin mem. Elmetita al la elprovoj kaj riskoj de la vivo, la homoj neniam sentas sin sendanĝera, neniam en paco. Li scias ke nur Dio estas eterna, ke Li havas la vivplenecon kaj vivas en gloro. Fakte, kiam ni pensas pri io granda, tuj ni diras, ke ĝi estas dia. Kutime oni supozas Dion fremda, tute malsama ol ni, vivanta fore, supre, en la ĉielo, ĉirkaŭata de anĝeloj kaj sanktuloj, faranta ĉion, kion li volas: li ne suferas, li ne malsaniĝas, li ne mortas. Mallonge, la gloro de Dio estas ĉio, kio mankas al la homo ĉi-sube. Sed tio estas nur envio.

Ireneo el Liono, male, skribas ke *«la gloro de Dio estas la vivanta homo»*. Per aliaj vortoj oni povas diri ke Dio sin glorias kiam li sukcesas pluteni vivanta la homon, eĉ en la fragileco kaj mizero. Simone Weil, fakte, pensante pri la homa realo, eĉ aŭdacas diri ke *«estis nekonceptebla amo tio, kiu emigis Dion krei vivantajn estaĵojn kiel nin, tiom malproksimajn de li kiom povas esti pensanta estaĵo»*. Kaj pli sube: *«Ju pli mi estas mediokra, des pli evidentiĝas la vasteco de la amo, kiu plutenas min vivanta»* (S. Weil, La amo de Dio).

Estas devige pro tio ripeti ofte: *«Via estas la gloro eterne»*, konsiderante ke Dio neniam sin glorias, kiel ni faras. Se aldone estas vere, ke nia vivo bone travivita glorias Dion, tiam ni malpermesu al ni vane fieri inter ni kaj ni gloru Dion hodiaŭ kaj eterne.



Dirite inter ni ...



029


IDEOJ

- Mi dezirus organizi konversacian ekzercon.
- Por tion fari, oni devas havi ideojn.
- Kaj vi, ĉu vi havas ideojn?
- Nu, en ĉi tiu momento mia kapo estas malplena.
- Kial?
- Se diri la veron, mia kapo ne estas malplena: ĝi estas tro plena.
- Nu, se ĝi estas tro plena, elirigu el ĝi la ideojn.
- La fakto estas, ke ĝi ne estas tro plena je ideoj, sed je zorgoj.
- Tio signifas, ke vi estas tro laca por pensi pri novaj ideoj.
- Estas precize tiel.
- Jen bela, solvota problemo.
- Malmulton oni povas solvi, oni devas venigi la ideojn.
- Prave vi diras, sed kiamaniere?
- Iel aŭ tiel, oni devas labori por atingi rezulton.
- Peza tasko.
- Sed tasko.
- En la vivo, oni trovas sin antaŭ malfacilaj situacioj.
- Kelkfoje okazas.
- Kaj en tiaj situacioj oni devas esti kapablaj regi sin.
- Ankaŭ se tio estas malfacila.
- Malfacila, sed ebla.
- Ĉu vi opinias, ke ankaŭ mi sukcesos fari ion?
- Pri tio mi estas certa.

IDEE

- Desidererei organizare un esercizio di conversazione.
- Per far ciò, si devono avere delle idee.
- E tu, hai delle idee?
- Beh, in questo momento la mia testa è vuota.
- Perché?
- A dire il vero, la mia testa non è vuota: essa è troppo piena.
- Bene, se è troppo piena, fanne uscire le idee.
- Il fatto è che essa non è troppo piena di idee, ma di preoccupazioni.
- Questo significa che sei troppo stanco per pensare nuove idee.
- È precisamente così.
- Ecco un bel problema da risolvere.
- Si può risolvere poco: si devono far venire le idee.
- Dici bene, ma in che modo?
- In un modo o nell'altro, si deve lavorare per raggiungere un risultato.
- Compito pesante.
- Ma compito.
- Nella vita ci si trova davanti a situazioni difficili.
- Alle volte succede.
- Ed in tali situazioni si deve essere capaci di governarsi.
- Anche se questo è difficile.
- Difficile, ma possibile.
- Credi che anch'io riuscirò a fare qualcosa?
- Di questo sono sicuro.

- Ĉu cent-procente?
- Cent-procente.
- En ĉi tiu okazo, ni vidu, kion oni povas fari.
- Ni provu rezonadi.
- Bela ideo, sed kun granda ĥaoso en la menso.
- Oni devas fari ion distrigan.
- Oni povus iri preni glaciaĵon.
- Iom promenadi.
- Paroli sencele.
- Al mi ŝajnas bona ideo.
- Kaj se la glaciaĵo estos bona...
- Pri tio ne zorgu: mi konas tre bonan glaciaĵ-vendejon.
- Ĉu oni povas elekti kiun ajn guston?
- Tiu vendejo estas fama pro la riĉo da gustoj.
- Tio provokas alian problemon.
- Tio estas?
- Tio estas, ke mi ne scios, kion elekti?
- Konsekvence venos problemo kroma.
- Nome?
- Ke post mallonge vi sentos ventro-doloron.
- Mi ne intencas manĝi tiom multe da glaciaĵo.
- Ĉu vi vidas, kiamaniere forpasas la zorgoj?
- Jes, ni ambaŭ pensas pri frandaĵoj.
- Tio estas distriĝo por ni.
- Kaj eble, se ni promenos, ni havos pluan distriĝo-kialon.
- Ni ekiru!
- Ni ekiru.
- Al cento per cento?
- Al cento per cento.
- In questo caso, vediamo che cosa si può fare.
- Proviamo a ragionare.
- Bella idea, ma con un gran caos nella mente.
- Si deve far qualcosa che provochi distrazione.
- Si potrebbe andare a prendere un gelato.
- Passeggiare un po'.
- Parlare a ruota libera.
- Mi sembra una buona idea.
- E se il gelato sarà buono...
- Di questo non preoccuparti: conosco una gelateria molto buona.
- Si può scegliere qualsiasi gusto?
- Quella gelateria è famosa per la ricchezza di gusti.
- Questo fa sorgere un altro problemon.
- Ossia?
- Ossia, che non saprò che cosa scegliere.
- Di conseguenza, si presenterà un problema ulteriore.
- Cioè?
- Che dopo un po' sentirai mal di pancia.
- Non ho intenzione di mangiare tanto gelato.
- Vedi in che maniera si allontanano le preoccupazioni?
- Sì, tutti e due pensiamo a delle leccornie.
- Per noi, questa è una distrazione.
- E forse, se cammineremo, avremo un motivo di distrazione in più.
- Incamminiamoci!
- Incamminiamoci.




LAŬRA KAJ ROZA

- Bonan matenon.
- Ĉu vi jam estas ĉi tie?
- Jes, hodiaŭ ni estas je via dispono por labori en la arĥivo.
- Nu, ni devas organizi la laboron.
- Ni estas ĉi tie.
- Ĉu vi prenis la ŝlosilojn?
- Kie ili estas?
- Kiel kutime, en la tirkesto.
- Ĉu ni devas preni la ŝlosilojn de la tri arkivoj aŭ nur de unu?
- Prenu la 4 ŝlosilojn de la ĉefa arĥivo.
- Jen ili.
- Ni povas ekiri.
- Ni sekvas vin.
- Ĉu vi ĝuis belan libertempon.?
- Mi estis en Sardinio.
- Ĉu Sardinio plaĉas al vi?
- Certe, ke ĝi plaĉas al mi: mi naskiĝis tie.
- Ha, vi pravas: vi jam diris tion al mi.
- Kie vi estis?
- En Stintine
- Bela loko, mi vizitis ĝin.
- Nu, nun mi scias, kie estis Laŭra, sed vi, Roza, kie vi liber-tempis?
- Mi estis en Kalabrio.
- Ĉar vi naskiĝis en Kalabrio.
- Jes, mi estis en Sorbo, kie vivas mia parenaro.
- Ĉu vi estis tie kun via edzo?
- Jes, kun mia edzo kaj kun Martina, mia filino.
- Ĉu Sorbo situas ĉe la maro?
- Ne, ĝi estas malgranda vilaĝeto kiu situas ne tro alte sur la montoj.
- Jen., ni alvenis.
- Ĉu mi malŝlosu la pordon?
- Memkompreneble.

LAURA E ROSA


- Buon mattino.
- Siete già qui?
- Sì, oggi siamo a sua disposizione per lavorare in archivio.
- Bene, dobbiamo organizzare il lavoro.
- Siamo qui.
- Avete preso le chiavi?
- Dove sono?
- Come al solito, nel cassetto.
- Dobbiamo prendere le chiavi dei tre archivi o solamente di uno?
- Predete le 4 chiavi dell'archivio principale.
- Eccole.
- Possiamo muoverci.
- Noi la seguiamo.
- Vi siete godute delle belle vacanze?
- Sono stata in Sardegna.
- Le piace la Sardegna.
- Certo che mi piace. Sono nata là.
- Ah, ha ragione: me l'ha già detto.
- Dove è stata?
- A Stintine.
- Bel luogo, l'ho visitato.
- Bene, ora so dove è stata Laura: ma lei, Rosa, dove ha fatto le vacanze?
- Sono stata in Calabria.
- Perché è nata in Calabria.
- Sì, sono stata a Sorbo, dove vivono i miei parenti.
- È stata lì con suo marito?
- Sì, con mio marito e con Martina, mia figlia.
- Sorbo si trova al mare?
- No, è un piccolo villaggio, che è collocato non troppo in alto, sui monti.
- Ecco, siamo arrivati.
- Devo aprire la porta?
- Naturalmente.

- Kaj vi, Laŭra, iru al la ŝaltiloj kaj lumigu.
- Ĉu mi ankaŭ funkciigu la aerumadon?
- Jes, pli bone, ke vi faru tion, ĉar la loko restis fermita dum 20 tagoj.
- Jen, farite.
- Bone. Roza, prenu la alian ŝlosilon.
- Por malfermi la enan pordon.
- Jes, ĉar vi scias, ke mi ne bone distingas la ŝlosilojn.
- Jes, mi scias, ke kiel ŝtelisto vi valoras nenion.
- Eniru.
- Ni iru al la bretaro numero 24.
- Ni alvenis.
- Ĉu vi vidas tiujn skatolojn?
- Jes, ni vidas ilin.
- Nu, ili estas tro grandaj kaj tro pezaj.
- Kaj kion ni devas fari?
- Nu, metu ilin sur la transportilon kaj portu ilin al la laborbretaro.
- Kaj poste?
- Vi devas dividi unu jaron de la alia kaj poste meti la dokumentojn en pli malgrandajn ujojn, laŭ alfabeto ordo.
- Ni komprenis.
- Tiamaniere, kiu ajn sukcesos preni la ujon por konsultado.
- Bone, ni komencu.
- Bonan laboron!
- E lei, Laura, vada agli interruttori e faccia luce.
- Devo far anche funzionare l'areazione?
- Sì, meglio che lo faccia, poiché il luogo è rimasto chiuso per 20 giorni.
- Ecco, fatto.
- Bene. Rosa, prenda l'altra chiave.
- Per aprire la porta interna.
- Sì, perché sa che non distinguo bene le chiavi.
- Sì, so che come ladro non vale niente.
- Entrate.
- Andiamo alla scaffalatura numero 24.
- Eccoci arrivati.
- Vedete quelle scatole?
- Sì, le vediamo.
- Ebbene, sono troppo grandi e troppo pesanti.
- E che cosa dobbiamo fare?
- Beh, mettetele sul carrello di trasporto e portatele allo scaffale di lavoro.
- E poi?
- Dovete dividere un anno dall'altro e quindi mettere i documenti in contenitori più piccoli, in ordine alfabetico.
- Abbiamo capito.
- In questo modo qualsiasi persona riuscirà a prendere i contenitori per la consultazione.
- Bene, incominciamo.
- Buon lavoro!





Nia eta Parnaso



Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

*Una piccola baia sul Mar Rosso,
pittoresca, animata. Il rumore festoso
impedisce di calarsi nella bellezza del
luogo. Bisogna allontanarsi, salire su
quello sperone di roccia proteso sul
mare. Lo spettacolo è indescrivibile...
nel silenzio, la Creazione...*

*Eta golfo ĉe la Ruĝa Maro, pitoreska,
vivoplena. La gaja bruado malebligas
sin enŝovi en la belecon de la loko.
Nepras foriri, grimpi sur tiun rostron
de roko etendiĝantan sur la maron.
La spektaklo estas nepriskribebla...
en la silento, la Kreado...*

NEL SILENZIO LA TUA VOCE

EN LA SILENTO VIA VOĈO

Ho fatto silenzio...
Silenzio intorno e
dentro me.

Non più brusio scomposto
di voci e suoni...

Dall'alto limbo roccioso
declivo sul mare,
ho fatto silenzio
e ho udito la Tua voce.

Ho chiuso gli occhi
e ho visto,
dall'immensa Tua mano,
la cellula amorfa
gettata sull'atomo terra,
in mille frammenti di vita,
impazziti,
dimentichi d'essere
parte del Tutto.

Nel silenzio,
ad occhi chiusi,
ascoltai il fruscio
dell'onda turchina lambire
il mio «essere-frammento»
del Tuo Tutto.


Mi eksilentis...
Silento ĉirkaŭ mi kaj
ene de mi.

Ne plu senorda zumado
de voĉoj kaj sonoj...

De la alta roka limbo
dekliiva sur la maro
mi eksilentis
kaj aŭdis Vian voĉon

Mi fermis la okulojn
kaj vidis
de Via senlima mano
la amorfan ĉelon
disĵetitan sur la atomo-tero
en mil eroj de vivo,
frenezigintaj,
forgesantaj esti
parto de la Tuto.

En la silento,
kun fermitaj okuloj,
mi aŭskultis la frotadon
de la blua ondo alkisi
mian «esti-fragmenton»
de Via Tuto.



PREGHIERA A DIO

23° cap. del "Trattato sulla Tolleranza"
di Francois Marie Arouet De Voltaire

Non è più dunque agli uomini che mi rivolgo, ma a Te, Dio di tutti gli esseri, di tutti i mondi, di tutti i tempi: se è lecito che delle deboli creature, perse nell'immensità, e impercettibili al resto dell'universo, osino domandare qualcosa a Te che tutto hai donato, a Te, i cui decreti sono immutabili in quanto eterni, degnati di guardare con misericordia gli errori che derivano dalla nostra natura.

Fa' sì che questi errori non generino la nostra sventura. Tu non ci hai donato un cuore per odiarci l'un l'altro, né mani per sgozzarci a vicenda; fa' che noi ci aiutiamo vicendevolmente a sopportare il fardello di una vita faticosa e passeggera.

Fa' sì che le piccole differenze tra i vestiti che coprono i nostri deboli corpi,

tra tutte le nostre lingue inadeguate,

tra tutte le nostre usanze ridicole,

tra tutte le nostre leggi imperfette,

tra tutte le nostre opinioni insensate,

tra tutte le nostre condizioni così sproporzionate ai nostri occhi e così uguali davanti a Te, insomma che tutte queste piccole sfumature che distinguono gli atomi chiamati uomini non siano altrettanti segnali di odio e di persecuzione.

Fa' in modo

che coloro che accendono ceri in pieno giorno per celebrarti, sostengano coloro che si accontentano della luce del tuo sole;

che coloro che coprono i loro abiti di una tela bianca per dire che bisogna amarti, non destino coloro che dicono la stessa cosa sotto un mantello di lana nera;

che sia uguale adorarti in un gergo nato da una lingua antica o in uno più nuovo.

PREÇO AL DIO

23.a ĉapitro de "Traktato pri la Tolerio"
de Francois Marie Arouet De Voltaire

Do, ne plu al la homoj mi min adresas, sed al Vi, Dio de ĉiuj estaĵoj, de ĉiuj mondoj, de ĉiuj tempoj: se estas permesate, ke malfortaj kreitaĵoj, perditaj en la senlimeco kaj nepercepteblaj de la cetera universo, aŭdacu demandi ion al Vi, Kiu ĉion donis, al Vi, kies dekretoj estas neŝanĝeblaj ĉar eternaj, degnu rigardi mizerikorde la erarojn, kiuj devenas el nia naturo.

Faru tiel, ke ĉi tiuj eraroj ne estigu nian ruiniĝon. Vi ne donis al ni koron por malami unu la alian, nek manojn por nin gorgotranĉi reciproke; faru tiel, ke ni helpu unu la alian en la subteno de la ŝargon de vivo laciga kaj efemera.

Faru, ke la etaj diferencoj inter la vestoj kovrantaj niajn feblajn korpojn,

inter ĉiuj niaj nesufiĉaj lingvoj,

inter ĉiuj niaj ridindaj kutimoj,

inter ĉiuj niaj neperfektaj leĝoj,

inter ĉiuj niaj sensencaj opinioj,

inter ĉiuj niaj kondiĉoj tiel malperfektaj ĉe niaj okuloj kaj tiel justaj antaŭ Vi,

entute, ke ĉiuj ĉi malgrandaj nuancoj, kiuj diferencigas la atomojn nomataj homoj, ne estu samnombraj signaloj de malamo kaj de persekuto.

Faru tiel,

ke tiuj, kiuj ekbruligas kandelagojn plentage por glori Vin, defendu tiujn, kiuj kontentiĝas per la lumo de via suno;

ke tiuj, kiuj kovras siajn vestojn per blanka tolo por diri, ke oni necesas ami Vin, ne abomenu tiujn, kiuj diras la samon sub nigra lana mantelo;

ke estu same adori Vin per idiomo naskiĝinta de antikva lingvo aŭ per unu pli nova.



Fa' che coloro
il cui abito è tinto in rosso o in viola,
che dominano su una piccola parte di un pic-
colo mucchio di fango di questo mondo,
e che posseggono qualche frammento arro-
tondato di un certo metallo,
gioiscano senza inorgogliersi di ciò che essi
chiamano grandezza e ricchezza,
e che gli altri li guardino senza invidia:
perché tu sai che in queste cose vane non c'è
nulla da invidiare, nulla di cui inorgogliersi.

Possano tutti gli uomini ricordarsi che sono
fratelli! Abbiano in orrore la tirannia esercitata
sulle anime, come odiano il brigantaggio che
strappa con la forza il frutto del lavoro e del-
l'attività pacifica! Se i flagelli della guerra sono
inevitabili, non odiamoci, non laceriamoci gli
uni con gli altri nei periodi di pace, ed impie-
ghiamo il breve istante della nostra esistenza
per benedire insieme in mille lingue diverse,
dal Siam alla California, la tua bontà che ci ha
donato questo istante.

Faru, ke tiuj,
kies vesto estas ruĝe aŭ violkolore tinkturita,
kiuj superreĝas malgrandan parton de mal-
granda kvanto da koto de ĉi tiu mondo,
kaj kiuj posedas iun ringan eron de iu certa
metalo,
ĝoju sen orgojliĝi pro tio, kion ili nomas gran-
deco kaj riĉeco,
kaj ke la aliaj rigardu ilin sen envio:
ĉar Vi scias, ke en ĉi tiuj vanaj aferoj estas
nenio enviinda, nenio pri kio orgojliĝi.


Povu ĉiuj homoj rememori, ke ili estas gefra-
toj! Ili hororu pri la tiraneco altrudata sur la
animoj, tiel kiel ili malamas la rabaĵoj, kiuj
deprenas perforte la frukton de la laboro kaj
de la paca agado! Se la plagoj de la milito
estas neeviteblaj, ne malamu nin reciproke,
ne disŝiru unu la alian dum la pacaj periodoj,
kaj ni utiligu la mallongan momenton de nia
vivo por beni kune per mil malsanaj lingvoj,
de Siano ĝis Kalifornio, vian bonecon, kiu
donis al ni ĉi tiun momenton.

Esperantigis Ida Bossi

Informoj el la lokaj grupoj

Rubrica a disposizione dei gruppi locali - Rubriko je dispoŝo de la lokaj grupoj

In Veneto è stato festeggiato il centesimo anniversario di due circoli esperantisti frequentati da numerosi membri dell'UECI. Congratulazioni, e avanti verso "la fina venko"!



VICENZA: Il "Vicenza Esperanto-Centro" ha festeggiato il suo secolo di vita sabato 29 giugno nell'ambito della manifestazione FestAmbienteVicenza nello spazio "Agorà" al parco Retrone.

Il presidente Filippo Zanoner ha brevemente raccontato la storia dell'esperanto a Vicenza, mentre il professor Carlo Minnaja ha tenuto una conferenza sul tema: "Alla ricerca della democrazia linguistica: un secolo di Esperanto". L'evento ha richiamato un buon numero di esperantisti veneti ed ha avuto una certa risonanza nella stampa locale.

PADOVA: Il "Gruppo Esperantista Padovano" ha festeggiato i suoi cento anni il 20 ottobre presso l'Auditorium del Centro Culturale San Gaetano di Padova. La manifestazione è stata anticipata da una S.Messa in esperanto celebrata nell'attigua Chiesa da fra Pierluigi Svaldi. All'inaugurazione sono intervenute alcune autorità cittadine. Vi hanno partecipato numerosi esperantisti provenienti dalle vicine regioni. Il presidente, prof. Carlo Minnaja, ha trattato il tema "Cen'anni di Esperanto a Padova". Il brindisi chiusura è stato aperto da musiche di Haydin lette da un trio: violino, violoncello e pianoforte.



Centro San Gaetano

20.a EKUMENA KONGRESO

Trento 16-23 Aŭgusto 2014 - Centro Mariapoli - Cadine

Dopo cinque anni si riprende la consuetudine dei Congressi Ecumenici. L'ultimo è stato quello di Wroclaw del 2009.

Dopo i Bibliaj Tagoj di Trento del 2012 con la partecipazione di un gruppo ristretto di persone, si è manifestato il desiderio, sia da parte cattolica sia protestante, di tornare a Trento per un più ampio Congresso Ecumenico.

Il congresso si svolgerà presso il Centro Mariapoli di Cadine che è particolarmente vocato agli incontri ecumenici. Tra l'altro il luogo ci è ben noto perché vi si è tenuto il Congresso UECl nel 2008.

Questo è un pre-annuncio perché il programma e le quote non sono ancora state fissate, però confidiamo nella presenza di numerosi italiani.

L'azione ecumenica è tra le finalità statutarie dell'IKUE e mai come oggi il percorso verso l'unità dei cristiani è stato tanto importante e urgente. In un mondo in cui tante forze anticristiane tendono ad emarginarci, fino al martirio di tanti nostri fratelli, è importante che noi superiamo tanti indugi e reciproche diffidenze che ci dividono. Tra l'altro i nuovi cristiani di terre lontane che si avvicinano al Vangelo non possono capire queste nostre divisioni. Nel nostro piccolo incamminiamoci anche noi sulla via dell'unità. Cristo lo vuole e attende un segnale da noi.

Per non disperdere le nostre forze in troppe iniziative



il prossimo anno **non ci sarà il congresso UECl**. Tuttavia, poiché in quel di Trento non ci sarà possibile inserire nel programma l'assemblea annuale dell'UECl, abbiamo pensato di organizzare un *Primtepa Kunveno*, sulla falsariga di quelli organizzati in passato e con successo, dal Katolika Esperanto-Centro di Milano. Ne parliamo nei dettagli sotto.

PRIMTEPA KUNVENO

Vicenza: 17-18 maggio - Casa del Sacro Cuore



Casa del Sacro Cuore

Per il *Primtepa Kunveno* è stata scelta la città di Vicenza perché, trovandosi sulla linea ferroviaria Milano Venezia, è

facilmente raggiungibile. La Casa del Sacro Cuore che ci ospiterà è in Corso Padova 122, a circa due chilometri dalla stazione F.S. ed ha un parcheggio interno. Non c'è ancora un programma definitivo, comunque si inizierà con il pranzo di sabato 17 maggio e si terminerà dopo il pranzo della domenica successiva. L'assemblea annuale UECl è prevista nel mattino di domenica 18 maggio. A suo tempo ad ogni associato verrà invi-

ata la convocazione con il programma. Ci si può iscrivere fin da ora: quota di iscrizione 10 euro. Per pensione completa (pernottamento, prima colazione e tre pasti) la quota per persona, da pagarsi sul posto al momento dell'arrivo, sarà di 70 euro per la camera doppia e 75 euro per la camera singola. Per particolari esigenze rivolgersi a Gianni Conti, telefoni.:

02.66301958 - 3396315211
o: giovanni.conti@alice.it.

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Il 5 di settembre 2013 è deceduta all'età di 88 anni presso la sua abitazione di Sanremo la nostra associata **Lucia Miano** per molti molti anni membro attivo dell'UECI. Animo poetico, alcune sue poesie di carattere religioso sono comparse su Katolika Sento negli anni '90 (l'ultima comparve nel 2007 in ricordo di Tonino Gambuti). Animo generoso, ultimamente, prima tramite don Duilio, poi tramite l'UECI, inviava periodicamente somme di denaro a favore dei ragazzi orfani e abbandonati di Goma. Il Signore la accolga nella sua casa.

Ricordiamola nelle nostre preghiere.

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2013

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a Katolika Sento (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a Espero Katolika (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.* codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di Katolika Sento è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni **DAMINELLI**, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it *(la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)*

Vice presidente: fra Pierluigi **SVALDI**, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco **POLITI**, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida **BOSSI**, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni **CONTI**, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma **COVELLI CESCOTTI**, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana **FOSSATI**, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo **SARANDREA**, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni **BALCONI**, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECI.

Ricordiamo che l'UECI dispone ancora di n° 3 premi da 258,23 € da assegnare a giovani iscritti all'UECI che conseguano il diploma di esperanto di terzo grado, come contributo per la partecipazione a un congresso dell'UECI o dell'IKUE. Rivolgersi al presidente dell'UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

Ateisto, urso kaj Dio

Ateisto promenas en la arbaro. lumomente, terura ursego malsata aperas antaŭ li. Li tuj fuĝas plejeble rapide, sed li stumblas kaj la ursego estas super li. Tiam li ekkrias:

- Mia Dioooo!!!

Tuj la ursego haltas, la arbaro silentas kaj voĉo tondras:

- Kiel! vi ĉiam neis mian ekziston, kaj nun vi alvokas min!

- Mi ne povas esti tiel hipokrita! sed vi povus igi la urson kristana!

- Bone, tiel estu!

La urso levas kaj kunigas la antaŭajn kruojn kaj diras:

- Sinjoro, benu la manĝaĵon, kiun mi estas prenonta.

(sendis Marilena Biasi)

Ĉe kuracisto

- Prenu ĉi tiun kuracilon po du fojoj tage, kaj jam postmorgaŭ, vi povas iri labori!!

- Dankon doktoro, vi ne nur resanigas min, sed ankaŭ vi trovis al mi laborpostenon!

Neantaŭvideblo

Kolportisto trairas la urbon por vendi novan pulvosuĉilon. Li frapas ĉe la pordo de nova domo, kaj kiam alvenas sinjorino por malfermi la pordon li tuj eniras, ĵetas rubaĵojn sur la plankon kaj diras:

- Mi montros al vi la mirindaĵojn de ĉi tiu polvosuĉilo. Se en du minutoj, ĝi ne enŝuĉas la tuton, mi manĝos tion tute.

- Ĉu vi deziras keĉupon?

- Kial?

- Mi ĵus alvenis en novan domon kaj ĉi tie ankoraŭ ne estas elektra kurento.

En dancejo

- Fraŭlino, ĉu vi volas danci?

- Jes, volonte!

- Bone, do mi povas sidi sur via seĝo.

En Paradizo

Post pli ol 50 jaroj da geedza vivo, li mortas kaj iras al Paradizo.

Post kelkaj jaroj ankaŭ ŝi iras al Paradizo. Tie ŝi retrovas lin, kaj kuras al li, kriante:

- Amo mia! Kiel bele estas revidi vin!!!

- Ne ĝenu min! Tiam la pastro estis tre klara: "ĝis la morto dividos vin"...

(sendis Carlo Sarandrea)

Ŝu-vendisto

Sinjoro eniras ŝuvendejon kaj aĉetas paron de ŝuoj. La prezo estas 100 eŭroj, sed, kiam li devas pagi, li ekrimarkas, ke li havas nur 80. La vendisto diras:

- Ne gravas sinjoro. Prenu la ŝuojn kaj revenu morgaŭ kun la mankantaj 20 eŭroj.

La kliento dankas kaj foriras. La edzino de la ŝu-vendisto, riproĉas la edzon:

- Kial vi fidas tiun nekonatan homon, certe li plu ne revenos.

- Li certe revenos. Mi donis al li du maldekstrajn ŝuojn.

